# Oscar López Rivera dankas la solidarecon.



Havano, 19 jan (RHK) Post esti informita pri la nuligo de la karcerpuno, depost 35-jara mallibereco en Usono, la portorika sendependisto Oscar López, dankis al Kubo pro la subteno donita favore al la liberiga kampanjo, kiu okazis en Portoriko kaj tra la mondo.

López Rivera dankis al Kubo kaj al la kvin kubaj herooj, kiuj ?iam rifuzis la maljustan punon,  per telefona parolado kun la prezidantino de la kuba instituto de amikeco al la popoloj, Kenia Serrano.

La menciita institucio  sendis mesa?on al la portorika popolo kaj al la monda movado de solidareco al Kubo pro la liberigo de Oscar López.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/118966-oscar-lopez-rivera-dankas-la-solidarecon

**Radio Habana Cuba**